Mem.—If you have paid your membership and your name does NOT appear on this list, please notify us at once, stating when and where you paid. If you have not paid,—may we expect your dues before the next issue? Please!

Selma, La Sopranulino

DE MABEL WAGNALLS

Aŭtorino de
 "Rozaĉjo Ĉiumiljara," "Palaco de Danĝero,"
 "La Freneza Kanto," "Miserere."

Tradukita de
 EDWARD S. PAYSON,
 Honora Prezidanto de la Esperanta Asocio
 de Norda Ameriko

(Daŭrigo)

Selma eniris la oficejon, la knabo eliris kaj fermis la pordon. S-ro Holmes estis okupita rigardante diversajn paperojn sur sia skribtablo, sed baldaŭ li supren rigardis, kaj eksaltis de surprizo.

"Selma! vi ĉi tie?"

Li eldiris ŝian nomon preskaŭ senkonscie kaj kun la malnov-tempa sentemeco. Sed li rapide regis sin. "La knabo eraris pri la nomo. Mi opiniis, ke li diris la nomon de unu el miaj kontribuistoj."

Li parolis rapide kaj iom nerve. Selma paŝis antaŭen kun radiantaj vizaĝoj kaj okuloj plenaj de amo.

"Mi venis la tutan distancon de Novjorko, Arturo, por vidi vin." Tio ne estis precize kion ŝi intencis diri, sed ĝi estis signifoplena.

S-ro Holmes nun parolis pli singarde. "Vi estas tre afabla! Sed via vizito tre surprizas min. Vi devas konfesi, ke mi ne havis kialon supozi, ke vi farus tiel longan vojaĝon pro mi."

"Ho, Arturo—ne parolu tiel malvarme; vi ne komprenas, Arturo. Atendu ĝis mi klarigos ĉion al vi."

Ŝia koro batis tiel rapide, ke ŝi estis preskaŭ senspira kaj ne povis diri plu; do Arturo denove parolis—ne severe sed malĝoje.

"Kiam unufoje, antaŭ longe, mi komencis paroli al vi per malsama tono kaj signifo, vi silentigis min, Selma, per letero, kiun mi ankoraŭ ne forgesas. Kial vi nun surpriziĝas?"

"Ne estis mia kulpo, ke mi sendis al vi tiun leteron." La tonoj de Selma estis impresaj. "Panjo diktis ĉiun vorton. Ĉu vi aŭdas tion, Arturo? Ĉu vi tute komprenas? Vi ne scias kion mi travivis!" Ŝi ne permesis, ke li interrompu ŝin. "Se vi efektive sciis, vi tiom kompatus min! Ĉu vi iam suferis, Arturo? Ĉu vi scias kion signifas labori, kaj marŝi kaj paroli kun ĉiam la sama penso en via menso, unu akra doloro en via koro; ĉiam sopirante al tio, kio estus povinta okazi, kaj bedaŭrante tion, kion vi faris?"

Selma hezitis momente, kaj tiam: "Panjo ne konsentis al nia fianĉiĝo ĉar—vi scias—."

Arturo finis la frazon. "Jes, mi scias; pro mia

patrino." Li tremis videble je la memoro.

Selma akcelis la fluon da siaj vortoj. Sed nun, ke ĉio estas forklarigita—mi legis pri ĝi en ĵurnalo—mi estis tiel feliĉa, ke mi ekiris hejmen per la unua vagonaro. Kaj, Arturo, jen mi estas!"

Ŝi ridis mallaŭte, preskaŭ histerie, kun la lastaj ĝojaj vortoj, kaj impulse etendis la manojn.

Tiam granda ŝanĝo venis al Selma ĉar Arturo ne respondis kiel ŝi atendis.

Li restis silenta dum momento, kaj tiam parolis malrapide: "Mi bedaŭras, Selma. Ĉu vi ne scias, ke mi estas fianĉigita?"

Selma staris senmove, apenaŭ komprenante la tutan signifon de liaj vortoj. Ŝi penis pensi, sed ne povis.

"Fianĉigita!" ŝi ripetis malrapide kaj kviete. "Kiam? kiel? al kiu?"

"Al Fraŭlino Ellis. Ŝi estis tie ĉi antaŭ kelkaj minutoj—vi verŝajne renkontis ŝin ĉe la pordo." Arturo parolis kviete, kaj la momento estis terura por ambaŭ.

"Fraŭlino Ellis," Selma ripetis la nomon malrapide. "Ĉu ŝi estas la filino de tiu advokato Kolonelo Ellis, kiu helpis vin?"

Arturo balancis la kapon.

"Kaj ŝi estas la junulino kiu preterpasis min ĉe la pordo?"

La pensoj de Selma venis pli rapide nun. "Kaj vi proponis edziĝon al ŝi!" Subita malkonsidera malespero venis al Ŝelma. "Ne, ne, mi ne kredas tion. Vi ne intencas ĝin, Arturo—ĉu ne—efektive?"

La rulsona maŝinaro ekstere daŭrigis strangan akompanaĵon al tiu ĉi klimakso. Arturo hezitis, kaj tiam respondis kun tranvileco kiun li ne sentis.

"Ĉio estas vera—tute vera—kaj tial tiu ĉi interparolado povas esti nur doloriga por ni ambaŭ. Mi petas vin, Selma, por mia kaj via propra bono, ĝi estu finita."

En tiu momento Selma ne estis en humoro aŭskulti al rezonado. "Ne, ne nun—ne forsendu min tiamaniere—estas tro terure!" Ŝiaj tonoj kiuj ĝis nun vibris kun intenseco, fariĝis trempetega. "Arturo, ĉu ŝi efektive amas vin same kiel mi? Kaj ĉu ŝi kantas kiel mi povas? Vi

amadis mian voĉon, Arturo, ĉu vi ne memoras?"

Li ja rememoris. La voĉo kiu ankoraŭ kantis en liaj songoj! Sed nun la paleco de lia vizaĝo malkaŝis la barakton interne de li kiam li paŝis preter ŝi, kaj diris:

"Mi rememoras ĉion, Selma, kaj mi rememoras ankaŭ, ke mi petis Fraŭlinon Ellis, ke ŝi edzinigu kun mi, kaj ke mi respektas ŝin. Ĉar se vi ne foriros, permesu al mi foriri."

Antaŭ ol li atingis la eksteran pordon Selma estis tie, barante al li la vojon. Ŝia voĉo estis tremanta kaj raŭka.

"Ne, ne—mi iros, tuj, mi promesas."

Estis momento da silento, kaj ankoraŭ ŝi staris ĉe la pordo, apogante sin al la kadro. Tiam ŝajne ŝi kolektis siajn dispelitajn fortojn kaj povis pensi antaŭ ol foriri. Ŝi pasigis manon trans la frunto, kaj kiam ŝi parolis ŝiaj tonoj estis pli trankvilaj.

"Ĉio finiĝas. Ne estu malĝoja, Arturo, ĉar la doloro ne estas pli akra ol antaŭe. Nun—mi foriros."

Denove ŝi hezitis kaj tiam daŭrigis rapide: "Mi promesas al vi, ke mi ne diros alian vorton, aŭ eĉ tuŝos vian manon por adiaŭ, sed mi havas unu deziron, kiu estas, ke vi rigardu al mi afable nur unu fojon ree, kiel antaŭe. Eĉ *ŝi* ne ofendiĝos pro tio."

Ĉi tiu petego venkis lian tutan kontraŭstaron. La malnova dolĉa afableco kiun ŝi tiel arde amis subite iluminis lian malĝajan vizaĝon dum li impulse ekkaptis ambaŭ ŝiajn manojn kaj longe rigardis al ŝi.

Laŭ ŝia promeso, ŝi faris nenian signon de petego, eĉ kiam Arturo fervore ekkriis per mallaŭtaj, rompigitaj tonoj:

"Selma, ni ambaŭ suferis—ĉu ne?" La sango fluis al lia vizaĝo dum li parolis. Ree li rigardis en ŝiajn okulojn ameme, sopireme, kaj tiam per subita peno li flustris "adiaŭ"—kaj lasis ŝin sola en la ĉambro.

Selma nek ploris nek svenis. Ŝi nur staris senmove, kun interplektitaj manoj. Baldaŭ ŝi konsciigis pri impresa silento. La maŝinaro ne plu funkciadis. Estis la tagmeza horo. Al Selma ŝajnis kvazaŭ ne nur la maŝinaro sed ankaŭ ŝia koro ĉesis funkci; vivo, la mondo kaj la tuta universo ŝajnis subite puŝegitaj el siaj pravaj pozicioj.

Ŝi rigardis ĉirkaŭ sin kaj enpensiĝis. "Mi devos ree sekvi la rutinon de vivo. Baldaŭ mi malfermos tiun pordon kaj elmarŝos. Se mi renkontos iun, mi devos diri "Bonan matenon!"

Ŝi fermis la okulojn pro efektiva laceco je la penso. Malfermante ilin ŝi okaze vidis malgrandan fotografajon sur la skribtablo de Arturo. Ĝi estis bildo de virino, kaj kiam Selma transiris la ĉambron, por pli proksima vido, ŝia konjekto konfirmiĝis. Ĝi estis admirinda kaj bela similaĵo de Fraŭlino Ellis.

Selma levis la bildon kaj longe rigardis la trajtojn. Stranga kliniĝo de palpebroj donis al la vizaĝo esprimon de malenergio, kaj estis tre beliga al Fraŭlino Ellis. Jes, ŝi estas bela, kaj li ĵus lasis ŝin mem por iri al tiu fraŭlino; li jam elektis inter ili! Ŝia fotografajo antaŭe troviĝis sur lia skribtablo. Li ofte diris, ke ĝi inspiris lin al lia laboro. Nun estis Fraŭlino Ellis kiu lin inspiras!

Senlima envio dum momento plenigis la kutiman mildan naturon de Selma, kaj amaraj pensoj trovis sian vojon en ŝian cerbon kaj timigis ŝin. En frenezeco de ĵaluza kolerego ŝi disŝiris la bildon, kaj tiam disŝiris la pecojn kvazaŭ ŝi ne povis sufiĉe detruiri ilin.

Tiam subite tiu nerva energio tute forlasis ŝin, kaj, fale sidigante, ŝi elĝemis: "Kion mi faras, kion mi pensas. Estas nur ĉar mi estas tiel tute mizera, tiel tute malfeliĉa!"

Ŝia malĝojo ŝajnis ja simila al io premanta sur ŝin. Ŝi klinis la kapon, kaj penis kolekti kaj regi siajn pensojn.

"Estis lia devo foriri; li nun apartenas al ŝi, kaj mi devas elporti la doloron, mi devas, mi nepre devas."

Kun la pasado de semajnoj Selma rekomencis sian vivon de laboro kaj studado, kaj batalis la batalon de sia koro laŭ sia plej bona kapablo.

Post tri monatoj Arturo Holmes kaj Marin Ellis geedziĝis.

(Daŭrigota)

Who is Who?

For three years we have printed short biographies of known pioneers and co-workers in the American Esperanto movement. We did so to make our readers acquainted with our leaders, past, present and future. We still have a short list of biographies on hand for the next few issues of A. E. But we want to prepare for later on. We also want to hear the "voice from our readers," as to who should be next in the spotlight.

Give us your opinion: First, shall we continue with our biographies? And second, give us ten names of such prominent samideanoj, whose merits in the movement entitle him, or her, to a special page in our magazine. Just write a postal with your ten names; no more—no less.


The following fifteen eminentuloj have already appeared and should *not* be voted.

Charles H. Briggs.	A. Kenngott.
P. P. Christensen.	George W. Lee.
John H. Fazel.	James F. Morton.
Henry W. Fisher.	D. E. Parrish.
Henry W. Hetzel.	Edward S. Payson.
Isabelle M. Horn.	Joseph R. Scherer.
Wayne Jackson.	Lehman Wendell.

H. I. Keyes.

Pick out your ten best bets and write us today.

Our Jubilee Propaganda Stamps



Ruĝa - Red

Blanka - White

Blua - Blue

Have you received your allotment of this year's stamps? If you did, have you made your return? And what did you return—the stamps or one dollar? If you have returned neither stamps nor dollar, do it now,—the dollar of course.

Many samideanoj like them and say so. "Three Cheers" for the designer, says Mrs. Belle Gochenouer, and continues:

I sing of them in the morning,
I dream of them at night;
If anyone can praise them more
Please state in black and white.

But then:

La markojn mi vere admiras,
Sed, mankas monon ilin akiri;
Kvankam ilin mi tre deziras,
Mi devas kontente daŭradi admiri.

(The designer is your own Assistant Secretary.)
Let us hear what others have to say:

La landkartoj, la ĉeno kun ĝiaj dudek-kvin ĉeneroj,—efektive la tuta reklammarko,—disdonas gloro la varman kaj fratan spiriton de Esperanto—"Dua Lingvo por Ĉiuj."

GORDON W. HEWES.

Jam dudek-kvin jarojn EANA kreskas en Norda Ameriko. La Esperanto stelo brilas en multaj urboj. Koloroj naciaj de Usono kaj Kanado subtenas la Esperanto-Verdon.

RUTH E. J. SEAVEY.

The eagerness with which all my friends demanded the stamps, combined with their unique symbolic value, convinced me that this issue is the best yet.

DWIGHT CULLER.

I think the stamps are most effective and should prove to be a very good advertisement of the Esperanto language.

GRETA HUTTENBACH.

These stamps should awaken the seemingly dormant American public to the realization that an international language is essential and that Esperanto is fulfilling all requirements.

MRS. H. E. DOMM.

Por plenumi ĝian celon propagandilo devas havi belecon, simetron, simbolismon kaj uzeblecon—kaj niaj novaj markoj enhavas ĉiun el ĉi tiuj ecoj.

R. M. QUACKENBUSH.

(Continued from Page 10)

"some years ago there was a lot of talk in the papers about it, but of late I have seen nothing."

So, there you are! Nothing in the papers!

We should use every possible chance to get the papers to print something. Report your meetings—a meeting unreported is a meeting lost as far as publicity is concerned. Do it now and do it always!

The other day I promised Mr. Claimé a surprise. Curiosity is burning him up. I hope he will have his surprise when he reads this little story in the very same paper that promotes the language of which I made believe I knew nothing.

Just played the part of ignorance to find out what the world thinks about us.

Pardon me, Mr. Claimé.

*Sonu, sonoriloj de Kristnasko!—
Veki ĝojon estas via tasko.*

—H. I. Keyes.

† Edward S. Payson

Honorary President of E. A. N. A. Died in Lexington, Mass.

A letter received at the Central Office September 24th, announced the death of our Honorary President, Edward S. Payson. Immediately we sent a telegram to Mrs. Payson and wired flowers in the name of the Association.

Fort Lee, N. J., September 24th, 1932.

Mrs. E. S. Payson,
403 Marret Road
Lexington, Mass.

Please accept the sincere expression of heartfelt sympathy on behalf of the Esperanto Association, my family and myself. With the passing of Mr. Payson we are losing the foremost champion of our cause in North America, but with his Esperanto literary achievement he has built an everlasting monument for himself. May he rest in peace; his memory will remain with us forever.

J. J. SUSSMUTH.

Edward Saxton Payson, one of the best known men in the piano industry, though retired from active life for several years, died early on the morning of September 22nd, at his hom in Lexington, where he had a large estate at 403 Marret Road.

Mr. Payson was born in Groton, September 26, 1842, and his parents were Rev. Albert Lemuel and Clarissa O. (Saxton) Payson. He was educated in the public schools of Salem and under private tutors. He began business as a clerk in the Commercial Bank in Salem where he remained for three years. Always interested in music he then turned his attention to operative work and he became a baritone singer in grand opera and with several organizations he traveled through New England and the provinces for a number of years.

Subsequently preferring to settle down to something that did not call for traveling, he associated himself with the Henry F. Miller Piano Company, and he remained with this house from 1882 to 1885. He then became connected with the Emerson Piano Company, and this association continued for many years until his retirement, when the company was absorbed by a mid-western piano concern several years ago. While with the Emerson, however, he became vice president of the company in 1903, and three years later the president.

He had been a member of the National Piano Manufacturers' Association, of which he was president in 1907 and 1908, and the Boston Music Trade Association, of which he also was president for two years, 1907 and 1909. He also was a member of the National Piano Merchants' Association of America, the Boston Chamber of Commerce and the Lexington Grange. He had long been active in Masonry and his brief recreation was gardening and at his place in Lexington when he was better able to give his personal attention to it, he had a beautiful garden which was often visited by flower lovers.

On July 10, 1872, Mr. Payson married Caro-

line A. Morrill, of Boston, who survives him.

Mr. Payson's activity in Esperanto is well known. He learned Esperanto at an age when many other men think of retiring from all activity. He joined our movement with real enthusiasm and became one of its productive promoters. As president of the Esperanto Association of North America he guided our organization through post-war difficulties and his marvelous physique, his clear and stentorian voice and his prominence in society added immeasurable dignity to our cause.

His scores of translations and original works in Esperanto, of which only a small part has been published, will remain an outstanding part of Esperanto's world literature.

Reminiscences from Friends and Admirers

From the man who followed in his footsteps:

All who were fortunate enough to know Mr. Payson were certainly struck with his appreciation of Esperanto as an important means for world progress. It was an ideal which always inspired him. Although at an advanced age when he began to study the language he continued until he had thoroughly mastered it. His many translations from the English reveal a most intimate acquaintance with the best in Esperanto style and diction.

A most lovable man; a true friend and counselor; one whose heart was thoroughly in sympathy with our movement,—such was our honored friend, Edward S. Payson. I recall with great satisfaction the two visits I was able to make to his home in Lexington in the summer of last

year. Though all realized then that his great age left small hope for many additional days, the news of his passing brings quite a shock. Li ripozu en paco!

HENRY W. HETZEL,
Pres. of E. A. N. A.

From our Esperanto Poet:

EDWARD SAXTON PAYSON
Honora Prezidanto
de EANA.

Funebras ni, no plendas, ke li mortis—
Ke la komuna sorto lin forportis;
Li longe vivis antaŭ Morto venis,
Dormigis lin kaj for de ni lin prenis.

Impona personeco estis lia,
Kaj laŭnature estis li genia;
Li partoprenis multajn entreprenojn,
Kaj bonsukceso kronis liajn penojn.

La vivpokalon li ja malplenigis—
Stimulis tio lin, ne ebrigiis;
Verkadis li, negocis, kaj bonfaris;
Kaj inter samtempuloj li elstaris.

Li finis sian taskon; kaj laŭ vero,
Li mem volonte iris for de Tero;
Do, kvankam ni funebras, ni ne ploras
Dum ni memoron lian althonoras.

H. I. KEYES.

From one of his closest Esperanto Friends:

Edward Saxton Payson passed away September 22, having reached almost the age of 90 (born September 26, 1842).

"Nia granda maljuna viro" was long the epithet applied to him by his samideanoj of Boston and vicinity. A brief story of his career is given (in Esperanto) in *Amerika Esperantisto* for September-October, 1929, the first of a series of brief biographies.

Esperanto was the dominant interest of the last twenty years of his life. He had known nothing of it until he had passed his seventieth birthday. And then what: Then he entered into the spirit of the language heart and soul and produced (beside much that has not yet appeared in print) the following well-known translations: "La Akrobato de nia Sinjorino," "Blanche, La Virgulino de Lille," "La Rozujo Ĉiumiljara," "Mizerere-Thais." The British Esperantist Company published his translation of "Mimi," "La Mistera Karto," and "Luno de Israel," (with M. C. Butler (Haggard). At the Edinburgh Congress (1926) a representative of Ferdinand Hirt & Son came from Germany to bring copies of "La Palaco de Danĝero," as the best translation of the year.

Mr. Payson had a collection of more than a hundred works in Esperanto which he would like distributed where they will be appreciated. He suggested the Boston Public Library as a depository, and doubtless that library will receive a goodly number.

What the world should appreciate and try to imitate, as the supreme quality of Mr. Payson as an Esperantist, was his precise use of language, first as a speaker and writer of English and then an equal master of the spirit of the great gift of Zamenhof, the exact rendering by the translation of what an author had in mind. His works should be widely read with that in view.

G. W. LEE.

His Funeral:

A lovely Fall day was Sunday, September 25th, when in the afternoon many gathered in Lexington to pay loving tribute to their friend. The sun shone brightly in the familiar library as we entered, but it looked a little different; the big table with its books, papers, manuscripts had been removed, though on a little table we saw the inkstand and the pen, which remained.

And between the two big windows the beloved one was lying in state to receive our last farewells, surrounded by the wealth of flowers he loved so well. Among them, just at the head, hung *La verda stelo*, sent by the Boston Chapter, and nearby the wreath from EANA.

The service conducted by the Rev. Paul H. Chapman was simple, as he would have liked it,—reading from the Scriptures, the poem "Abou Ben Adhem," and a few words of the loved personality, of the smile and of the voice that no one will ever forget. When Mr. Chapman was installed in the parish in Lexington only a month before, as one of his first pastoral duties he made visits to the members who for one reason or another were shut-ins. When he called at the Paysons, what was his surprise and delight to recognize the one from whom he had taken a course in Esperanto in Boston about a dozen years ago. And many times during those last weeks he came and cheered through the hours of intense suffering. Many were the quiet talks they had, when Mr. Payson told of his aim in life always to do right, to make the most of life, and of no fears for the future. A stately Masonic service followed.

Many token of love and affection have already been received from Esperanto friends by Mrs. Payson, which space does not permit us to mention. The most distant in miles, but perhaps most fervent in feeling, was from Dr. J. U. Giesy, of Salt Lake City, whose "Mimi" was translated and published by the BEA during Mr. Payson's presidency of EANA.

To us who have often heard the great, melodious voice, nothing could surpass his favorite Prayer of Allah as he rolled out the last line: "May the Peace of Allah abide with Thee."

E. J. M.

From his successor in the Piono Business:

The world held but one Edward Payson. In every attribute pertaining to the lovable and endearing qualities of fine manhood and sympathetic understanding his was a towering figure.

A chivalrous knight of exemplary character has answered his summons to Valhalla. Deeply inscribed on his escutcheon will be found symbols denoting nobility of thought, word and deed. It was my privilege to know and enjoy intimately and return his friendship and love which I count as a blessing.

I mourn with you the assing of this grand old man.

And in conclusion:

A friend has left us—an irreplaceable friend. Association with him was a privilege. His hand-written letters always brought a welcome message. Until his last days his voice bore the strength of perfect manhood. His devotion to our cause was exemplary. Kind words for friend or foe—such was his attitude of life. His mental productiveness at ninety would be a credit to youth in the twenties. His life's story merits to be written in full as an inspiration to coming generations.

His passing leaves an empty space which I prefer to keep empty and filled only with *His Memory*.

J. J. SUSSMUTH.

Mrs. Droop joins with me in fully sharing your deep grief and sorrow.

EDWARD N. DROOP,
(Pres. Droop & Sons, Washington Piano Co.).

From one of his thousands of disciples:

The voice of the Emerson piano, which my father bought from Mr. Payson for my musical education, will forever be associated with the memory of the genius and personality of Mr. Payson.

CARMEN SYLVIA SUSSMUTH.

*To the Esperanto Association of
North America.
Acknowledging with deepest gratitude your
kind expression of sympathy.
Mrs. Edward S. Payson.*

Kandidato De Prezidanteco Pri Lingvo Internacia

F. STANCLIFF

Sinjoro Norman Thomas, ekspastro presbiteria, kiu forlasis sian preĝejon por paroli kontraŭ milito kaj malamikeco inter nesamlandanoj, paroladis pri la principoj de socialismo antaŭ aŭskultantaro da du mil kvar cent personoj en la urba armilejo, de Akron, Ohio, la 8an de Septembro.

Ĝus antaŭ la parolado, mi ekhavis okazon por eta intervjuo kiam li jam estis preta paŝi sur la tribunon. Mi demandis lin ĉu li ŝatus diri ion por publikigo pri internacia lingvo, sen mencio de iu lingvo speciala. Li respondis *tuj* ke li opinius ke la mondo nepre bezonas internacian lingvon, sed ĉu tiu lingvo estos *Esperanto* (nun li silentas momente por pensi) aŭ I—o, aŭ—a, li fakte ne scias.

Rimarko de la redaktoro. Alia iama kandidato de Prezidanteco de Usono estas S-ro P. P. Christensen, kiu nun estas nia tre fervora samideano kaj vic-prezidanto.

The Payson Books

No one has done more than Edward S. Payson toward the creation of an American Esperanto Literature. All his books are of the highest merit and should be in the possession of every Esperantist. Buy them all or at least one a month.

Akrobato de Nia Sinjorino25
Blanche35
Karto Mistera35
Mimi, Giesy-Payson35
Miserere kaj Thais50
Roziĵo Ĉiumiljara, Wagnalls-Payson35
Lando de Arĝenta Akvo25
Juneco kaj Amo—Paper35
Cloth60
Luno de Israel	1.50
Palaco de Dangero	1.50
La Fantoma Edzino10

Esperanto Association of North America
Fort Lee, N. J.

Ekzercaro

Graduated Exercises in Esperanto

By Dr. L. L. ZAMENHOF

These lessons, compiled by the author of Esperanto, serve as an excellent "Second Course" after the study of Sussmuth's *Esperanto Course for Beginners*. Use the *American Esperanto Key* for words not found in the *Beginners' Course*.

(Both books are given free to new subscribers to *Amerika Esperantisto*.)

1A LECIONO.

1. Infano ne estas matura homo.—2. La infano jam ne ploras.—3. La ĉielo estas blua.—4. Kie estas la libro kaj la kraĵono?—5. La libro estas sur la tablo, kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro.—6. Sur la fenestro kuŝas kraĵono kaj plumo.—7. Jen estas pomo.—8. Jen estas la pomo, kiun mi trovis.—9. Sur la tero kuŝas ŝtono.

2A LECIONO.

1. Leono estas forta.—2. La dentoj de leono estas akraj.—3. Al leono ne donu la manon.—4. Mi vidas leonon.—5. Resti kun leono estas danĝere.—6. Kiu kuraĝas rajdi sur leono?—7. Mi parolas pri leono.

3A LECIONO.

1. La patro estas bona.—2. Jen kuŝas la ĉapelo de la patro.—3. Diru al la patro, ke mi estas diligenta.—4. Mi amas la patron.—5. Venu kune kun la patro.—6. La filo staras apud la patro.—7. La mano de Johano estas pura.—8. Mi konas Johanon.—9. Ludoviko donu al mi panon.—10. Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo.—11. Antaŭ la domo staras arbo.—12. La patro estas en la ĉambro.

4A LECIONO.

1. La birdoj flugas.—2. La kanto de la birdoj estas agrabla.—3. Donu al la birdoj akvon ĉar ili volas trinki.—4. La knabo forpelis la birdojn.—5. Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj.—6. Bonaj infanoj lernas diligente.—7. Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron.—8. De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon.—9. Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo.—10. Mi legas libron.—11. La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.

5A LECIONO.

1. Papero estas blanka.—2. Blanka papero kuŝas sur la tablo.—3. La blanka papero jam ne ku-

ŝas sur la tablo.—4. Jen estas la kajero de la juna fraŭlino.—5. La patro donis a mi dolĉan pomon.—6. Rakontu al mia juna amiko belan historion.—7. Mi ne amas obstinajn homojn.—8. Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro!—9. Bonan matenon!—10. Ĝojan feston! (mi deziras al vi).—11. Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ).—12. Sur la ĉielo staras la bela suno.—13. En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn.—14. La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka.—15. Lakto estas pli nutra, ol vino.—16. Mi havas pli freŝan panon, ol vi.—17. Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli, freŝa, ol mia.—18. El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna.—19. Mi estas tiel forta, kiel vi.—20. El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

6A LECIONO.

LA FEINO

1. Unu vidvino havis du filinojn.—2. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis povis pensi, ke li vidas la patrinojn.—3. Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.—4. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.

7A LECIONO.

1. Du homoj povas pli multe fari, ol unu.—2. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn.—3. Li promenas kun tri hundoj.—4. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj.—5. El ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj.—6. Kvin kaj sep faras dek du.—7. Dek kaj dek faras dudek.—8. Kvar kaj dek ok faras dudek du.—9. Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin.—10. Mil okcent naŭdek tri.—11. Li havas dek unu infanojn.—12. Sesdek minutoj faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj.—13. Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la dek-unua, De-

cembro estas la dek-dua.—14. La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro.—15. La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj.—16. Kion Dio kreis en la sesa tago?—17. Kiun daton ni havas hodiaŭ?—18. Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto.—19. Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.

8A LECIONO.

LA FEINO (Daŭrigo).

1. Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino vermege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna.—2. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉeĉe.—3. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon.

9A LECIONO.

1. Mi havas cent pomojn.—2. Mi havas centon da pomoj.—3. Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj.—4. Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj.—5. Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron.—6. Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon.—7. Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t.e. (=tio estas) dek frankojn.—8. Kvinoble sep estas tridek kvin.—9. Tri estas duono de ses.—10. Ok estas kvar kvinonoj de dek.—11. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas kvar kaj duonan frankojn (aŭ da frankoj).—12. Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro.—13. Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope.—14. Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.—15. Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.—16. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

10A LECIONO.

LA FEINO (Daŭrigo).

1. En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki.—2. "Tre volonte, mia bona," diris la bela knabino.—3. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune.—4. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino.—5. "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari

al vi donacon"—6. (Ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino).—7. "Mi faras al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono."

11A LECIONO.

1. Mi legas.—2. Ci skribas (anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi").—3. Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino.—4. La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra.—5. Ni estas homoj.—6. Vi estas infanoj.—7. Ili estas rusoj.—8. Kie estas la knaboj?—9. Ili estas en la ĝardeno.—10. Kie estas la knabinoj?—11. Ili ankaŭ estas en la ĝardeno.—12. Kie estas la tranĉiloj?—13. Ili kuŝas sur la tablo.—14. Mi vokas la knabon, kaj li venas.—15. Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas.—16. La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi.—17. La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi.—18. Knabo, vi estas neĝentila.—19. Sinjoro, vi estas neĝentila.—20. Sinjoroj, vi estas neĝentilaj. 21. Mia hundo, vi estas tre fidela.—22. Ni diras, ke la vero ĉiam venkas.—23. En la vintro oni hejtas la fornojn.—24. Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.

12A LECIONO.

LA FEINO (Daŭrigo).

1. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi, revenis tiel malfrue de la fonto.—2. "Pardonu al mi, patrino, diris la malfeliĉa knabino, "ke mi estis tiel longe."—3. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj.—4. "Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro.—5. "Sajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj!—6. De kio tio ĉi venas, mia filino?"—7. (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino).—8. La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.—9. "Se estas tiel," diris la patrino, "mi devas tien sendi mian filinon.—10. Marinjo, regardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas;—11. ĉu ne estas al vi agrable havi tian saman kapablon?—12. Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile."

(Daŭrigata)

*Ni al vi saluton donas**Dum Kristnaskaj kantoj sonas.*

—H. I. Keyes.

*Jen vortoj belsonaj por tuta homaro:
Ĝojega Kristnasko, kaj Gaja Nov-Jaro!*

—H. I. Keyes.

New Books : Novaj Libroj

Nyckel till Esperanto. (Ŝlosilo de Esperanto). Laŭ la normoj de I. C. K. eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm. I. 9a eldono, 100a—120a milo.

En malpli ol du jaroj vendinte 20,000 ŝlosilojn, la sveda eldonejo esperantista reeldonis ĝin en 20,000 ekz. La nova eldono estas tute novkompostita kaj presita per kliŝoj. La vortaro estas iom pliriĉigita. La nova ŝlosilo donas tre agrablan impreson pro sia klara preso kaj bona papero.

120,000 ŝlosiloj en la sveda lingvo, jen bona pruvo pri la multa laboro farita por nia afero:

Walter Kloeppfer, Vagabondo kaj sinjorinoj. Romano tradukita el la germana lingvo de Ludwig Goppel. Broŝurita kaj duontole bindita. Amplekso: 204-paĝa. Formato: 20 cm×14 cm. Prezo por la bindita ekzemplero gmk. 440 kaj por la broŝurita gmk. 2.80. Eldonejo: "Heroldo de Esperanto," Brüsseler Str. 94, Koln, Germanujo.

Henrik Seppik-Ernfrid Malmgren, *Systematisk kurs i Esperanto.* (Sistema kurso de Esperanto) Eld. Soc. Esperanto, Poŝta fako 698, Stockholm I, Svedujo. 88 paĝ. Prezo: 0,75 sved. kronoj.

La verkintoj multe okupis sin pri direktmetoda kurso kaj verkis libron kun laŭtempa enhavo. La frazaro estas ordigita laŭgrade kaj la vortoj estas plej grandparte modernaj kaj la enhavo tre interesa.

La lernolibro faris grandan sukceson. La eldoninto sciigas ke dum tri monatoj vendiĝis 3,000 ekzempleroj, bona pruvo ke ĝi plaĉas al la publiko kiu lernas Esperanton.

Elinar Dahl: *Dialogoj en Esperanto.* Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Eld. Soc. Esperanto, Box 698, Stockholm. I. 32 pag. Prezo 0:50 sved. kronoj.

La verkinto kolektis por dek dialogojn kun simpla kaj facila enhavo. La temoj ne estas elektitaj laŭ certa tendenco, kontraŭe ili estas de malsimilaj specoj. Malnovaj fabloj tute forestas, ĉar la verkinto klopodis havigi temojn el la ĉiutaga vivo, iuj povas interesigi gejunulojn nuntempajn. Tre laŭdinda kaj imitinda!

Rio De Janeiro—Iustrita gvidlibro pri Rio de Janeiro, eldonita de "Touring Club de Brasil" (Av. Rio Branco 137-6'andar) kun tekstoj en kvin lingvoj (portugala, franca, angla, hispana kaj Esperanto).

Ĉiu, kiu sendos respondkuponon al Brazila Ligo Esperantista (Av. Marechal Floriano 212-Rio de Janeiro, Brazil), ricevos ekzempleron de tiu belega iustrita gvidlibro.

Dek Cenda Serio. Redaktanto: A. Kenngott. Eldonitaj de la Internacia Eldonejo, Schitstr. 1. Magdeburg-N. 9 Germanujo.

No. 1. *La Fantoma Edzino* de Edward S. Payson.

Trege bela rakonto de la fama verkisto kaj la lasta kiun sinjoro Payson vidis antaŭ sia morto.

No. 2. *Rubezahl* de Hilde Scholze. Belega poezia rakonto pri la fama Rubezahl, pli bone konata en Germanujo.

No. 3. *Usono* de A. Kenngott.

En tiu ĉi libreto nia konata kunlaboranto pentras la vivon en Usono. Ĝi estas speciale skribita por eksterlandanoj kaj nepre forigos multan miskomprenon pri la vivmanieroj en nia lando. Ni rekomendas ĝin kiel bonegan legolibron por klasoj.

Trafafita Dekreto, de Iv. Tkaĉk, tradukita el Ukraina lingvo de Nitkin, kaj eldonita de EKRELO en Leipzig, konsistas el tri pensigaj rakontoj pri la cirkonstancoj sub kiuj la ukraina proletaro luktis, kaj kiel ili baraktis por libereco. Pro la iom eksterordinara sintakso uzata en la Esperanto traduko, ĝi ofte similas al poezio.

Preso estas bona; prezo .60 Gm.; 72 paĝoj. A. F. D.

En la Lando de Hindenburg, de Larissa Reissner; tradukita el la germana de Kampfrad kaj Krey; eldonita de EKRELO; 80 paĝoj; prezo ne indikita. Tiu ĉi libreto enhavas kvin "bildojn" el diversaj partoj de Germanujo kiuj estis viditaj en 1924.

A. F. D.

Homarisma Laboro, originala unuaktaĵo de Kenelm Robinson; eldonita de la aŭtoro; ĉef-deponejo ĉe Literatura Mondo; 31 paĝoj. Per trafa skizo la verkisto montras la ŝajnon de nia reforma laboro kaj bezonon por sincera laboro. A. F. D.

Zamenhof, de Julius Gluck; eldonita de Haase, Berlin; Prezo 25 pfenigoj; 8 paĝoj. Jen estas memor-paralado en la Esperanto-Gruparo Berlin, en Esperanto kaj en la germana lingvo.

A. F. D.

Weimar, Goethe-Memorjaro, 1932 estas la titolo de bele iustrita faldprospekto eldonita en Weimar, kaj sendita al ĉiu interesulo senpage. Petu ekzempleron de la "Verkehrsverein Weimar," Weimar, Germanujo.

Konversacia Gazeto, eldonita de la Internacia Cseh-Institute de Esperanto, enhavas plej diversajn kaj utilajn informojn pri la Esperanto-movado. Ĝi celas bonvenigi la novajn Cseh-kursintojn al la movado kaj konatigi ilin kun la diversaj organizoj, libroj, poemoj, kaj la historion de Esperanto. Ĝi ankaŭ entenas bonajn konsilojn kaj estas nur domaĝe ke oni pli akcentas la gravecon

de la naciaj Esperanto-asocioj. La gazeto estas redaktita konforme kun la spirito de la Csehmetodo, kaj malgraŭ ke ĝi estas la "unua kaj lasta numero" ĝiaj 20 paĝoj plenumos antaŭe sentitan mankon.

A. F. D.

Kiel Mi Lernis, de Maksim Gorkij; eldonita de EKRELO; 23 paĝoj; prezo Gm .20. Per tiu ĉi libreto Gorkij montris la vojon al klerigo pere de legado de libroj. Eble la libreto ne plu taŭgas por la usona proletaro ĉar la plejmulto scipovas legi.

A. F. D.

Rumana Bonhumoro en elektitaj rakontoj, redaktitaj kaj tradukitaj de P. Firu kaj S. Pragano. Jen estas 62 paĝoj da interesa legaĵo kiu bonhumore bildigas kelkajn trajtojn de la kamparana rumana popolo. Prezo broŝ. 2 sv. fr., tole bind. 3 sv. fr., inkl sendkostoj. Mendebila ĉe: L. Moreau, Raapopscheweg 55, Arnheim Nederlando.

